

ESPERANTO

Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio

1 9 4 6

39-a jaro N-ro 494 (2)

Marto-Aprilo

(Fondita 1904, ne aperis dum 1943-45)

Fondinto: H. Hodler, † 1920

Redaktoro: Hans Jakob
Palais Wilson
Genève, Svislando

ENHAVO:

| | |
|---|-------|
| Pozitiva programo | 9 |
| Esperantismaj problemoj | 10—11 |
| — Nia ideologio — | |
| Bibliografio de Esperanto | 11 |
| Necesa klarigo | 11 |
| Eĥoj de malantaŭ la fera kurteno | 12 |
| Kie estas kiu? | |
| Servo de reserĉado | 13 |
| Internacia Korespondado | 14 |
| Petoj kaj proponoj | 14 |
| Niaj mortintoj | 14 |
| Universala Esperanto-Asocio | |
| Oficiala Informilo 2 | 15—16 |

| | |
|--------------------------------------|--------------|
| Jara abono | Fr. sv. 10.— |
| (Kun ricevo de la jarlibro & premio) | |
| Anonco: | |
| Korespondado du linioj | 1.— |
| Reklamo: | |
| Kolonero unu centimetro | 1.— |

Poŝtĉeko svisa: Genève I 2310
Poŝtĉeko belga: Bruxelles 184200
Poŝtĉeko franca: Lyon 221-76
Poŝtĉeko sveda: Göteborg 44381
Bokförlaget Kosmos
för Universala Esperanto Asocio

Pozitiva programo.

Du gigantaj katastrofoj en interspaco de tridek jaroj trafis nian movadon. La jaro 1914 vidis nian penadon en rimarkinde bela perspektivo kaj la 10-a kongreso en Parizo devis doni al Esperanto novan, ni diru ŝtatoficialan direkton. Relative facile nia movado saniĝis de la vundoj kaŭzitaj de la militado 1914—18, escepte unu, la izoligo de l'soveta teritorio, ludonta tiom gravan rolon en la epoko sekvinta 1918.

Giganta kiel la dua militado tutmonda estas ĝiaj sekvoj en ĉiuj rilatoj. Senutile estas ja, ripeti tie-ĉi tion kion civitano spertas ĉiutage. Interesas nin, koni la amplekson de la perdo kiun suferis nia movado kaj la rimedon egaligi ĝin dum tempospaco ne tro longa.

Kion ni perdis efektive? Unue kaj ne kompanseble: la sennombraj samideanoj mortintaj aŭ mortigitaj. Due kaj restarigeble: la riĉa materialo dokumenta, la eldonajo detruitaj. Kaj la tria perdo estas la eligo de plia grava lando el la rondo familia, eligo perforta en 1933. Ni opinias Germanujon, kies nuna stato kaŭzas kapdoloron ne nur al ĝiaj venkintoj!

Post farita konstato, ni ekzameni la pozitivan flankon de l'afero. Kiel pozitivan fakton, ni povas rekoni la persiston kaj eltenon de l'movado en la landoj kiujn la milito ne tuŝis rekte, plie la firman konvinkon pri la nedetruibleco de nia ideo. Se materie ni staras antaŭ ruinoj, morale ni ne estas venkitaj: ni eltenis!

Kion fari por ĉion ripari? Fari la demandon, signifas ĝin respondi.

Ĉefa kaj unua kondiĉo de rapida rekonstruo de nia movado estas la ordigo de la internacia organizo, tio signifas, ke estu nur unu organizajo, anstataŭ du sin konkurencantaj. Alia kondiĉo estas, ke estu deklarata kvinjaro de stabileco, tempo dum kiu ne estu diskutata publike ia organizprincipa problemo. Ĉi-tiuj du kondiĉoj realigitaj, estu starigata programo por kvinjara laborado, kun aŭ sen fiksado de atingota celo.

Tiu-ĉi „kvinjarplano“ devos enteni sekvantajn klopodojn:

1. Esplori la eblecon restarigi la movadon en la USSR, kie Esperanto komplete malaperis.
2. Klopodi ke la Aŭtoritato Okupacia en Germanujo, permesu nian agadon (propagando, kursoj, societa vivo, servoj k.t.p.)
3. Repreni la interrompitan laboron pri Interŝtata Akordo pri Esperanto.
4. Ekzameni funde la diversajn aspektojn de niaj kongresoj, celante seriozigon de tiu-ĉi manifestacio, fariĝinta pli malpli turisma okazajoj aranĝi internacian laborkongreson en 1947 aŭ 1948.
5. Studi la sistemigon de l'eldono de unuformaj lernolibroj, ĉe kiuj la Landaj Organizaĵoj Esperantistaj partoprenu.
6. Restarigi la servojn de UEA parte aŭ tute haltigitajn pro la milito, nome, propaganda (eldonigi ŝlosilojn), turisma, bibliografia, uzo de E ĉe poŝto, radio, telegrafo, k.t.p., por memori nur la ĉefajn.
7. Organizati la helpon al la restintaj anoj de la Zamenhofa familio kaj daŭrigi ĝenerale la servon de UEA, konatan sub nomo „Esperantista, Interhelpo.“

La supra listo citas nur laborojn internacie farotajn kaj sukcesantaj nur, se ĉiuj sincere kunlaboras metante la aferon super personaj preferoj. Pri la aspekto de l'unuopaj problemoj kaj la realigo de la programo ni informos la publikon en venonta artikolo detaliga.

Esperantismaj problemoj

Sub tiu-ĉi titolo aperis ĝis 1934 artikoloj pritraktantaj demandojn aŭ problemojn de nia agado vidataj de sendependa starpunkto. Ni reprenas tiun-ĉi liberan diskutadon celante informi la publikon objektivite kaj senpasiie. Redakcio de ESPERANTO.

I.

Nia Ideologio

Pasis premo pezinta sur nin de post 1933, kiam ekkomenciĝis la Miljara Regno. Ja estas banala ŝerco diri hodiaŭ ke mil jaroj forflugis inter 1933-1945. Ĉi-tiuj 12 jaroj estis unu nura ĉeno de maljusteco, trompo, mistifiko, sango, larmoj kaj detruado.

En tiu-ĉi apokalipta pentraĵo feliĉe troviĝas kuragiĝaj detalaĵoj ofte ne tuj konstatitaj. Flanke de la tro videblaj ekzemploj de l'homa nesufiĉeco, ekzistas ankaŭ la signoj kontraŭaj, la kuraĝa defendo de l'homara idealo. Rezisti kaj elteni fariĝis signalvortoj jam antaŭ 1939 de tiuj homoj kiuj preferis morti ol vivi en sklaveco. Inter tiuj defendintoj de l'homa libereco troviĝis ankaŭ la plimulto de l'esperantistoj. Se materie nia movado estas parte detruita, ĝi morale kaj ideo eltenis kaj venkis.

Konvenas koni kiel kondutis nia movado kaj la unuopaj samideanoj dum tiu-ĉi periodo. Ne por bleki kontraŭ „kunlaboruloj“ (collaborationistes!) sed por tiri utilajn konkludojn por la rekonstruado kaj la estonto.

La finon de nia movado en Germanujo, ĝian agonion de 1933-1936 ni jam priskribis en ESPERANTO 1936 p. 122-124. La finan piedfrapon al nia afero donis Martin Bormann, leŭtenanto de l'Führer, kunrespondeca por multaj krimoj militaj kaj civilaj. Estinta prezidanto de la „Deutsche Sprachverein“, la societo por la germana lingvo, iam scienca societo, fariĝinte post 1918 naciista kaj en 1933 nazi-ula! Nu, la Sprachverein estis malkaŝa kontraŭulo de ĉia sinteza lingvo kaj do de Esperanto. Ne malmultaj kleraj germanoj revis pri universala rolo de l'germana lingvo, kio estus kompletigonta la politikan regadon de l'mondo, pretenditan de l'ŝovinistoj.

Kaj nun demando: „Kia estis la sinteno de l'esperantistoj, germanaj kaj alinaciaj?“ Je la honoro de la germanaj esperantistoj ni diru, ke la pli granda parto da ili, kun malĝojo kaj ĉagreno rezignacie akceptis la transformon de Germanujo, kredante kun milionoj aliaj civitanoj „ke eble ne fariĝos tro terura“. Pri kelkaj samideanoj ni scias ke ili aktive kontraŭstaris naziismon, iuj perdis oficon kaj eĉ la laborrajton. Pri la kompatindaj judoj ni nenion diru; ili estis ja tuj eksigitaj el ĉiuj rajtoj, escepte unu solan: krevi.

La bildo ne estus komplete se ni ellasus ankaŭ aliajn, nome tiuj, kiuj aliĝis al la nova religio. Inter ili ni distingu du: la pasivaj, kiuj silentis, rezignacie rigardis la okazaĵojn. La aktivaj estas tiuj, kiuj malkonfesis ĉion kaj transiris konvinke al Hitlerismo. Tria kategorio en la komenco de l'fantoma spektaklo, estis la „savantoj“, samideanoj kredintaj ke sufiĉas levi la brakon krii laŭte „Heil Hitler“ kaj ĉio aranĝiĝos. La grotesko estis la fondo de la Novgermana Esperanto-Movado, germanlingve la „Neue Deutsche Esperanto-Bewegung kun komenclitera mallongigo -NDEB- por similigi la NSDAP! Tiu-ĉi NDEB estis en opozicio al la Germana Esperanto-Asocio, kiu ne sufiĉe laŭte deklamis la novajn sentencojn. Tiom pri la germanoj, ni revenos ankoraŭfoje je ili.

La esperantistoj en negermanaj landoj reagis malsame. Nur malmultaj komprenis kia danĝero minacos nian movadon. La infan-naiva citaĵo pri Esperanto en la libro „Mein Kampf“ estis konsiderita kiel flankajo same kiel la ŝtatviroj de l'mondo ne konsideris je sia ĝusta valoro aliajn fantaziaĵojn de l'verkinto.

Por UEA la situacio fariĝis decida jam en 1933. La universala kongreso invitita de antaŭ-hitlera registaro, devis okazi en Kolonjo. Amaso da demandoj alvenis en Genève al UEA ĉu sub la ŝanĝitaj cirkonstancoj la kongreso povos okazi. La germana registaro Janus-kapa certigis, ke ni senĝene povos kunveni.

Por fiksi la respondecon la Estraro de UEA sub prezido de Ed. Stettler dediĉis tutan matenon al la „germana problemoj“, okaze de la Paska kunveno.

Por koni la opinion de nia publiko, S-ro Stettler skribis leteron al la kongresa komitato, publikigitan en ESPERANTO no. 393 paĝo 98.

Nature iuj oportunistoj plendis inter ili la Germana Asocio, prezidita de Arnold Behrendt. La intenco de UEA estis ne partopreni la kongreson, se certa nombro da samopinianoj estus postulintaj klaran pozicion. Ed. Stettler skribis tiam al H. J. „Se cent kongresanoj negermanaj postulas ke oni ŝanĝu kongreslokon UEA respondos al tio kaj oficiale malmendos la kongreson!“

La inerteco de l'homoj venkis sur la principeco. UEA partoprenis kaj sub la signo de l'Tria Regno (ho, kia ironio!) efektiviĝis la „Interkonsento de Kolonjo.“

La lasta atako venis en 1934. La Novgermana Esperanto-Movado postulis de l'UEA centro la forigon de la Delegitoj ne-ariaj en Germanujo kaj minacis denunci la Asocion, se eĉ nur unu juda Delegito reprezentos germanan lokon. Grava momento! La Direktoro, ordoninte presigi la jarlibron 1934 en Magdeburg, telefone haltigis ĝin. Due li informis la NGM por gajni tempon ke laŭ dekreto de l'Ministerio de l'Interno, la rasleĝoj germanaj neniel tuŝas la partoprenon de judoj eĉ sciencaj, fakaj kaj ne-ekonomiaj organizaĵoj. Por ni estis tute klare, ke ni ne cedos. La Direktoro de UEA farinte siajn spertojn kun la oportunismo reganta, skribe deklaris, ke li rifuzos kategorie submetiĝi kaj ne finlaboros la jarlibron 1934, se oni devigus lin forigi judajn delegitojn pro premo perforta.

La epizodo finis per memvola ekŝiĝo de l'koncernaj delegitoj, inter ili ekzemple S. Freund kaj F-ino Wolfson en Breslau, D-ro Bluth en Bad Neuenahr, D-ro Liebeck en Berlin k. a.

Pro ia fuŝeto, la nomo de unu Delegito (D-ro Cohnberg, Berlin) restis en la jarlibro kio kaŭzis ankoraŭ malagrablan incidenton kun la ĉefo de l'centprocentaj pursanĝaj (mal) samideanoj. Ĉi-tiuj 100% uloj plej energie klopodis por ke malaperu de l'scenejo esperantista la verkinto de l'nuna artikolo. Post Stockholm (1934) nova komitato estris UEA kaj 100 procenta germano la Centran Oficejon.

Tiam aperis tiu-ĉi senfine sentakta artikolo en ESPERANTO no 412 (1934) paĝo 169 „La germana vidpunkto pri la rasproblemo.“ Ni atentigu, ke tio okazis sub la ofico de l'nova Estraro en kiu troviĝis simpatianto de l'Nazi-reĝimo, D-ro Vogt el Stuttgart!

La skismo en UEA okazis en sama jaro (1936) de l'nuligo de nia movado en Germanujo. La ŝtupoj de tiu-ĉi nuligo estis: **1933**. — Disiĝo de laboristaj esp. organizaĵoj, SAT LEA. **1934** — Anoj de l'nazisocialista partio ne povas esti membroj de esp. organizaĵo: **1935** — Instruistoj ne plu rajtas aktive labori por Esperanto: **1936** — Nuligo de ĉiu esp. organizaĵo.

Sed la reĝimo en Germanujo ne nur kontentigis nuligi niajn organizaĵojn konfiski havaĵojn, ĝi ankaŭ insultis nin. En ilustrita, broŝuro pri la framasonoj, disdonita en kelkaj milionoj da ekzempleroj, UEA estis citita kiel dependa de sekreta juda registaro, kune kun aliaj organizaĵoj.

Tiu-ĉi histeria manio kredigi al la mondo ke „kulpas la judo por ĉiu malbono” ja ne devus nin ĉagreni. Sed ni ne forgesu „calumniare, semper aliquid haeret” t.e. „kalumniu, ĉiam io restas” kaj la agantoj por Esperanto devis kontraŭbatali ĉi-tiujn kalumniaĵojn. Tiu-ĉi sintenado de l'germana registaro kontraŭ nia afero, aŭtomate nin puŝis en firman opozicion kaj ĝi klarigas nian sintenon sekvantan.

La malinda traktado de l'judoj, la anekso de Aŭstrio la dismembrigo de l'Ĉeĥoslovaka Respubliko trovis sian eĉion en nia revuo ESPERANTO, depost oktobro 1936 denove redaktita de H. J. kaj por partopreni en la tutmonda penado por la viktimoj, ni kreis nian servon „Esperantista Interhelpo”. Ne mankis protestoj pro nia abandono de l'neŭtraleco indiferenta. Sed silenti sub simila stato signifus subteni la krimojn.

La konkludo estas: Ne estas tolereble, ke ni ignoru okazaĵojn. Ni devas okupi klaran pozicion en homaraj problemoj alivorte ni devas havi ideologion. Ĝi estas poezie esprimita en nia himno. La simpla prozo estas, ke ni devas simpatie kaj agante helpi ĉion, kio akcelas la amikecon inter la gentoj. Nia signalvorto: Ĉio tuthomara estas nia. Hans Jakob.

Bibliografio de Esperanto

Dragan N. Dimitrijeviĉ: Je li moguĉ, i je li potreban jedan međunarodin pomoćin jezik. (Traduko el bulgara en serban lingvon de propaganda broŝuro de Prof. S.Šmanov) — 32 paĝa, 15×11 cm. Presejo Globus, Petrovgrad 1946 (Jugoslavio) — Prezo ne montrita —

Unua propaganda broŝuro postmilita aperinta en Jugoslavio, plaĉe presita.

Joseph W. Dubin: The green star — 19,5×13,5 cm 282 paĝoj — National Institute of Esperanto, Philadelphia, Pa. Prezo ne montrita. (Bindita kun kolora kovrilo)

(La verda stelo, riĉe dokumentita verko pri la ideo de lingvo internacia, ĝia realigo per Esperanto, la esp. organizaĵoj kaj faktoj)

Tiu ĉi libro aperinta en 1945 nur alvenis ĉe ni dum pasinta oktobro, Ni preparolos ĝin en venonta numero de ESPERANTO.

Urba biblioteko Saint-Omer, P. d. C., (Francujo) — Esperantista Fako Katalogo de la esperantistaj libroj, arkivoj kaj memoraĵoj.

Kompilita de Ernest Deligny, ano de la Lingva Komitato. 24×16 cm, 48 paĝoj. 1942. Presis Imprimerie Loëz, Saint-Omer.

Ernest Deligny: Mia Esperantista Vivo, 1900-1943. 23×15,5 cm, 32 paĝoj. 1943. Presis Imprimerie Loëz, Saint-Omer (Ilustrita) Prezo: 30.

Estas ĉiam interese sciigi pri la vivo esperantista de pioniroj kaj ekzistas jam kelkaj tiaj aŭtobiografioj. Sinjoro Deligny pris-

kribas sian partoprenon en la Esperanto movado kronologie, jaron post jaro kaj estas kortuŝe vidi el la linioj, la fidon al bona afero kaj persiston neŝanceligeblan.

Richard Levin: Nouveau Cours d'Esperanto, en seize leçons suivi d'un vocabulaire français-esperanto et esperanto-français 17×11 cm 176 paĝoj. 1945. Presis Imprimerie Granchamp, Annemasse Haute-Savoie. En vente chez l'auteur: 55 Ave. Félix-Faure, Lyon.

Nova lernolibro por francoj, taŭge aranĝita de kompetentulo pri kursinstruado. La bonan enhavon kompletigas bela formo, la libro estas plaĉe presita, spite la sennombraj komplikaj kiujn oni renkontas por presigi esp. lernolibron en nuntempa Francujo. Richard Levin estas gratulinda pro tiu ĉi valora aperaĵo.

International Auxiliary Language Association (IALA) — General report 1945 — 21,5×13 cm 64 paĝoj (En angla lingvo)

Recenzo pri tiu ĉi raporto de l'agado de IALA aperos en venonta numero.

Sonu, kanto, sonu! Esperantistaj kantoj-Laborista marŝo — Naciaj kantoj — Modernaj kantoj — Popolkantoj — Ludkantoj — 48 paĝoj, 14,5×11 cm kompliitaj de Yrjö Nummi, G. J. Ramstedt, Aini kaj Vilho Setälä.

Esperanto Instituto de Finnlando, Helsinki 1945 Presis K. F. Puromies.

Pensoj de Zamenhof — tradukitaj el Esperanto (en franca, angla, germana kaj itala lingvoj) 32 paĝoj, 20×12,5 cm Eldonis Svisa Esperanto-Societo, Bern 1945, presis Büchler & K-io, Bern.

Necesa klarigo.

La mizero reganta en militintaj landoj, alvenigas petojn al la nemilitintaj landoj por helpi. Ankaŭ nia „Esperantista Interhelpo” ricevas tiajn petojn, kiujn ni volonte plenumus, se tio estus eble al ni.

Sed pri tiu-ĉi ebleco regas malkompreno. Pro la grandioza helpo de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco en Genève, la servo kreita de l' YMCA (Unio de Kristanaj Jun-viroj) kaj fine de la svisa popolo per la „Svisa Donaĵo” (Schweizerspende/Don Suisse) ne malmultaj suferantoj opinias, ke nur necesas al individuo en Svislando, oferi kelkajn frankojn por provizi petinton per sendaĵo de butero, fromaĝo lakto, ĉokolado k.t.p. Nu, ĉi-tiuj ŝatataj objektoj estas, „raciigitaj” t.e. la konsumo estas limigita. Aĉeti libere estas do neeble kaj la individua eksporto malpermesita. Kion kolektive povas eksporti la „Schweizerspende/Don Suisse” estas precize tio, kion la popolo svisa cedas. Kaj por certigi, ke ne okazu maljustaĵo en la disdono, estas nur la nomitaj helporganizaĵoj kiuj estas ŝargitaj tion fari. Senkontrola kaj libera akir-kaj sendebleco kaŭzus, ke nur finance bons'ataj personoj povus permesi al si sendi aŭ venigi tiajn pakaĵojn. Kontraŭe ekzistas ebleco sendigi el certaj landoj — Portugalio, Svedlando, Usono, Danlando k.a. — mangaĵojn laŭ difinita plano, sed je alta prezo! Peradas tion en Svislando entreprenoj, specialigintaj pri tio.

Kion ni faris kaj povas fari estas informi, konsili, peradi!

Volonte ni havigas svisajn medikamentojn, kondiĉe ke ili estas facile sendeblaj (pulvoroj, piloloj, ne likvidaĵoj). Kiam temas pri specialaĵo ricevebla nur laŭ ordono de l'kuracisto, oni aldonu tion.

ESPERANTISTA INTERHELPO.

Ĥoj de malantaŭ la fera kurteno

Aŭstrio

Ni citas el letero datita 11-II-46 (alportita de D-ro Bardasy) la jenon:

Ni komencis tuj post la militfino restarigi la organizaĵojn kaj ni kreis superpartian federacion, kiu englobas la estintan Aŭstrian Esperanto-Ligon kaj la aŭstrian federacion sub la nomo de Aŭstria Esperanto Federacio. La centra sekretario trovigas en Wien I. Neutorgasse 9 (Telefono U 20-3-51). Ĝoje ni informas, ke la Ministerio por Edukado allasis nian lingvon kiel instruobjekton en ĉiuj kategorioj de la lernejo. La Universitato por tutmonda komerco kaj ĉe la teknika universitato nia lingvo estas egale envicigita en la studprogramon. Aperos post nelonge Aŭstria Esperantisto, la organo de la federacio. Plie ni fondis eldon-entreprenon TRAMONDO kaj ni jam eldonis lernolibron (Freude durch Esperanto, du poŝvortaroj German-Esperanto — Esperanto-germana) kaj ni intencas eldoni proksime du romanojn kaj unu novelon. Estas granda intereso por esp. literaturo kaj ni petas eksterlandajn firmojn fari al ni ofertojn.

Aŭstria Esperanto-Federacio.

Bulgario

Bulgara Esperanto-Asocio, nuna adreso: ul. Graf Ignatiev 2, Sofia.

Hungarlando

Ni presigas leteron de Julio Baghy: Budapeŝt 31-XII-1945 (Alvenis en Genève 22-I-46)

Tre kara amiko kaj samideano,

dum la kelkjara deviga silento mi travivis la duan mondmiliton, jen la vivsigno, per kiu mi salutas vin kaj ĉiujn geamikojn kiuj ankoraŭ rememoras pri mi. La postmilita situacio nur nun alportis la unuan okazon proksimiĝi al tiuj, kiuj — dank' al Dio — ne estis devigataj finsuferi la pli ol vandalajn kruelaĵojn de la ĵus pasinta universala hombuĉado. Mi bone scias, ke ankaŭ vi sentis la pezan manon de la milita monstro, tamen mi supozas, ke ne tiel senpere, kiel ni.

Ĉi tiun leteron mi sendas pere de travojaĝantaj policanoj hungaraj. Ĝi entenas du petojn: unu oficialan kaj unu privatan. Esperable la plenumo de la unua ne renkontos malfacilaĵojn; koncerne la duan peton mi ja dubas, tamen mia situacio devigas min riski la peton.

Tuj post la sieĝo de Budapeŝt la budapeŝtaj esperantistoj revigliĝis — verdire dum la tuta milito ni fortostreĉe klopodis konservi nian moralan forton kaj savi ĉion saveblan — kaj de tiam ankaŭ mi devas produkti pli por la movado ol dum la militaj jaroj. Dum la sieĝo mi havis preskaŭ trimonatan malsanon pro sangveneniĝo, sed tuj poste mi alsiĝis al mia skribotablo kaj verkis 40-paĝan propagandan broŝuron kaj 12-13 folian novan gramatikon por hungarlingvanoj. La unua aperis en aŭgusto, la dua ĵus estas sub preso. Mi kaj miaj amikoj, malnovaj batalantoj de la ideo — s-roj Kökény, Kalocsay, Tider, Totsche Balkányi k. a. — profitas ĉiun okazon por fari paroladojn en fabrikoj, universitato, gimnazioj.

Antaŭ tri monatoj mi estis vokita al la nova demokratia ŝtatpolico por akcepti la referantan pozicion en la Budapeŝta Polica Societo. Bela laboro: parte pedagogia, parte kulturmisia tasko. En la kadro de la nomita korporacio mia samideano dr. Tóth kaj mi sukcesis fondi la Esperanto-sekcion de la B. P. S. kaj tie fine nia afero havas esperon por atingi seriozajn sukcesojn. Ĝis nun pli ol ducent policanoj anoncis sin por kursoj. La sekcio havas favorajn financajn ŝancojn. Mia multflanka okupateco forprenas mian tutan tempon, ofte de frumatena kvara horo ĝis vespero mi laboras. Nu, labori mi ĉiam ŝatis. Tamen mi bezonus ioman helpon.

Pro poŝtaj malfacilaĵoj kaj transiraj malhelpoj internaciaj nia sekcio ne povas akiri interrilatojn, kiuj instigus la novajn adeptojn. Mia oficiala peto estas do: bonvolu sendi kia ajn propagandan materialon, broŝurojn, eventuale librojn, gazetojn en nia lingvo. Tre bone efikus, se ankaŭ adresojn de korespondemuloj vi povus sendi al nia sekcio: Esperanto-sekcio de la Budapeŝti Rendör Egyesület, V. Budapeŝt, Nádor utca 16. I. 116.

Mi ne scias, ĉu esperanta gazeto jam aperas aŭ ne. Se jes, mi petas vin, faru mallongan raporteton pri la fondo de nia sekcio, parte menciante, ke tiu ĉi nova organizaĵo estas unu el la pruvoj, ke la reorganizita hungara polico sub komandanteco de subgeneralo Ladislao Solyom, ĉefkapitano de Budapeŝt, fariĝos vera demokratia korporacio de la ordo.

Verdire la subgeneralato estas ne sole eminentulo de sia fako, sed ankaŭ larĝhorizonta inteligentulo, kiu interesiĝas ankaŭ al nia movado. Mi proponas al vi, se UEA ankoraŭ ekzistas, vi skribu al li gratulan leteron pri lia komprenemo de nia packonstrua, vere demokratia movado internacia. Per tio vi certe multon helpus al nia movado hungarlanda.

(Sekvas privata peto, kion ni ellasas. Red.)

Pardonu, amiko kara, ke mi kvazaŭ trudas al vi tian laboron, sed al kiu mi povus turni min, se ne al malnova bonkora amiko kaj samideano? Vi eĉ ne povas prezenti al vi, kiom malfacile mi decidis fari tiun ĉi peton. Neniel mi dezirus, ke vi miskomprenu min! Sed kiel eble, rapide agu, ĉar la situacio ĉiutage malboniĝas.

Akceptu koran saluton kaj antaŭan dankon de via:

Julio Baghy.

Rumanio

Letero el Bukureŝto:

La rumana cenzuro estis forigita kaj ni povas libere kaj rapide komuniki kun vi!

Tuj post la falo de la faŝismo ni regroupiĝis kaj komencis reorganizi la movadon, en Bukureŝti kaj en la grandaj provincaj urboj. Nun, la entuziasmo por nia movado estas granda. Perdojn gravajn kaj karajn ni ankaŭ havis dum la milito.

Nun la fiereco ke neniu el nia rondo ŝanceliĝis je la homara „interna ideo“ kredo dum la flirtado de la faŝista standardo, ni tutkore, samideane salutas vin.

29 Januaro 1946.

Rumana Esperantista Societo
S. Zal. Gen. Sekretario.

Kie estas kiu?

Servo de reserĉado, nova servo de UEA.

Nia nova servo trovis ĝeneralan aprobon kaj ĉiutage alvenas informoj por tiu-ĉi rubriko. Hodiaŭ ni konigas la adresojn alvenintajn ĝis fino de Januaro 1946.

La venonta numero de nia gazeto enhavos memorajon pri la mortintoj 1939-1945, plenan liston kun citaĵo.

Redakcio de ESPERANTO.

Nuna adreso de:

Fino Palmyre De Cock, Pieter Conckestraat 2, Aalst, Belgio, satus ricevi informojn pri Lucie De Cock, arestita de la GESTAPO la 22-3-1943 kaj vidita lastfoje la 21-3-1945 en la kampe de Mauthausen, Aŭstrio. Personoj kiuj estis en tiu-ĉi kampo, bonvolu tion anonci al UEA.

Sinjoro Torkom Aslanjan, D de UEA, nuna adreso, Sv. Kl. Ofiriski 5, Burgas, Bulgario.

S-ro Norbert Barthelmess, estinta redaktoro de SENNA-CIULO, devigite reveni Germanujon komence de la milito nun vivas en Düsseldorf — Laŭ informo de SAT bulteno.

S-ro André Boyer, DM de UEA, nuna adreso: 12 Ave. St. Louis, Cannes, Francujo.

Sinjoro Léopold Brieger, eks-delegito de UEA en Düsseldorf kaj rifuĝinto al Brazilio en 1939. Lasta adreso c/o Produtes Juca, Rua Acre 10 sobrado, Rio de Janeiro. Estas petata doni vivsignon al UEA, Genève.

S-ro Wlad. Ciesielski, ulica Abramowskiego 39/25, III. p. Łódź, Polujo.

Majstro Onisabro Degučić, la fondinto de la Oomoto movado, konvinkita Esperantisto, kiu invitis siajn disĉiplojn lerni la internac'a lingvon, ree estas libera, sekve de la venko del' aliancanoj. (Laŭ Flandra Esp.)

S-ro L. Didisheim, el Genève, kasisto de la Esp. grupo Geneva, nun: 14, Ave. Denfert-Rochereau, Besançon Francujo.

Sinjoro Roman Fiedorowicz, Majoro, pola ano de UEA, Royal Navy Air Station, Dekheila, Alexandrie, Egipto.

S-ro Henriko Fischer-Galati, E-pioniro en Rumanio, DM de UEA en București, Rumanio, vivas kiel rifuĝinto sur insulo Cipro.

S-ro Henriko Gielb, pola esp-isto vivinta en Francujo: 70 Notting Hill Gate, London W. 11.

D-ro Adolf Halbedl, advokato, iam en Graz, nun: Schmittgasse 17, Knittelfeld, (Aŭstrio).

Sinjoro Theo Hanssen, pastro em., malnova esperantisto, nuna adreso 86, E. 13 th. Street, Chicago Heights, Illinois USA.

S-ro Herbert Häussler, estinta D de UEA en Reichenbach, (Vogland), German; nun militkaptito POW 316 — 1 888 966 H; PW WC 445; 7089 Lab. Serv. Co. (Germ.) 5 th. Lab. Supv. Area, A P O 772; U. S. Army.

Sinjoro M. Hulusi Aydmoglu, malnova Delegito de UEA en Aidin, nuna adreso: Kurtulus 27, Aidin, Turkio.

S-ro D-ro Franz Jesse, militkaptito, Prisoner of war no. 618 546 P. o. W. Camp, 23, Great Britain.

Profesoro Frédéric Ph. Kiehl, ĝis 1939 en Haguenau, nun: 10, Rue de l'Eglise, Bischwiller, Bas-Rhin, Francujo.

S-ro Alfredo Klein (estinta D de UEA en Vieno), nuna adreso: str. Urugáy 795, Montevideo (Urugvajo).

S-ro Avenir Kolomyjec, ukraina esperantisto, troviĝas nun en tendaro de dislokigitaj personoj. — Adreso: Displaced persons Camp, Lexenfeld 21, Salzburg, Aŭstrio.

Militkaptito Willi Kratzmann, No. 32 079, Prisoner of war camp No. 9 Great Britain (Devenas el Mannheim, Germanujo).

S-ro D-ro Walter Lippmann, nuna adreso: 601 W, 168 th street, New York 32.

S-ro Julius Mathes, Sternwaldstr. 5 Freiburg i. Br., German.

Sinjoro Max Mendlewicz, Delegito de IEL, en Lens (Nord) rifuĝinto en Svislando, nuna adreso: 46 Rue Alfred Dumeril, Toulouse H. G. (Francujo).

Sinjoro St. Minkov, estinta komitatano de UEA kaj de IEL, nuna adreso: 129, Str. Sredna Gora, Sofia.

S-ro Ar. Nikolov, esp. presisto en Sevlievo, nun: str. Gurko 1, Sofia, Bulgario.

Rifuĝinto Kurt Nissen el Frankfurt a. M., germana civilinternito antinazi-a/ en Svislando, nun: chez M. Breuillé, 16 rue Brey, Paris XVII.

S-inc Paula Pirchan, estinta D de UEA, nuna adreso, Hauptplat. 12, Waidhofen a. d. Thaya, Aŭstrio.

Sinjoro Herman Röhlig, iama Delegito de UEA, nuna adreso: Vodni ulice 7-a en Jablonec nad Nysou, Ĉeĥoslovakio.

S-ro Eugeno Ryttenberg, de Varsovio: str. Cuza Voda 45-A, Bucuresti, Rumanio.

Civilkaptito Walter Simon (civilian), B. 21 396, P. o. W. Camp, Great Britain (Devenas el Wehrstedt-Halberstadt, restadis kvinjaron en germana koncentrejo liberigita de la britoj kaj nun en Britujo).

D-ro Spindler, DM de UEA, antaŭe en Toul M. et M; nun 17, Rue Toupot, Chaumont, H-te Marne (Francujo)

Fino Julie Supichová, la korekta adreso estas: Praha II, Malá Stepanská 6.

S-ro Issak Zafranski, estinta D de UEA en Rowne, Volinio. Pola Respubliko, nun: Poste Restante, Bytom, Polujo. Deziras forlasi la landon kun sia familio 3 kapa. Serĉas parencon kun nomo Cunia Kaganski, dentisto laŭdire vivanta en Bern, Genève aŭ Zürich. Ni ne povis trovi tiun ĉi nomon en la adreslibroj; ni daŭrigas esplori. UEA.

Esperantista Akademio

Oostduinlaan 32 Den Haag, Telefono: 11 01 72

La prezidanto de la Akademio, Sinjoro Ir. J. R. G. Isbrucker, invitas la anojn de la Lingva Komitato anonci sin al li por la repreno de la laboro.

Edziĝo

Ni ricevis la jenan presitan informon:

Sinjorino Vidvino Frans Schoofs, havas la honoron anonci al vi la edziĝon de sia filo Léon kun Fraŭlino Gisèle Descamps. Antverpeno (Kl. Hondstraat 11) — 16 an de Februaro 1946.

Temas pri la filo de nia energia kunbatalinto FRANS SCHOOFS tro frue mortinta (1934) kaj multaj amikoj, nun grizigintaj, memoras la filon Leoneke; okaze de vizito al la estinta centro de la belga movado la Kleine Hondstraat 11. Sincerajn bondezirojn. UEA.

Internacia Korespondado.

Parolante, korespondante kaj legante, la nova esperantisto akiras certan gradon de perfekteco en la lingvo. La korespondado en nia lingvo nun reprenas sian an'auan amplekson. Anonco en tiu ĉi rubriko estas senpaga por la membroj de UEA, aŭ 1.— fr. sv. pagebla en neuzitaj poŝtmarkoj ĉiulandaj (3 foje la afranko de letero al eksterlando) — Ĉiu anoncanto havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al ricevita korespondaĵo pere de tiu ĉi anonco. Mallongigoj: PI = poŝtkartoj ilustritaj, L — letero, PM = poŝtmarkoj, k. ĉ. l. — kun ĉiuj landoj.

Aalborg (Danemarko). — S-ro B. Andersen, Teglværksalle 11-11, PM PI., objektojn laŭ interkonsento.

Birmingham (Angl.) — S-ro J. Collier, 14 Warren Hill Rd., Erdington, PM., k. ĉ. l.

Domery près Rian (France, Cher) — S-ro Maurice Moinrot, PI kunterkulturistoj, agronomoj, vegetaranoj kaj kamparanoj ĉ. l.

Moulins s. Allier (Francujo) — S-ro Joseph Kolovratek, 75, Rue de Bourgogne, L., PM., k. ĉ. l.

Nivelles (Belgujo) — S-ro Jozefo De Maeyer, katolika pastro, profesoro en Collège S-te Gertrude, deziras kontaktiĝi kun misiistoj ĉiulandaj.

Peizermade — Drenthe (Nederlando) — S-ro A. H. Haupt, PI., L, pri ornitologio kaj aliaj temoj, librojn, k. ĉ. l.

Prades (Francujo, Pyr. Or.) — S-anino Jeanne Dedieu, 23, Rue Victor Hugo, petas pri korespondservo. Petu de ŝi francan korespondanton. Ŝi skribigos alvi la plej taŭgan.

Praha XI (Ĉeĥoslovakio) — Ĉeĥoslovakaj policistoj, anoj de „Polica Esperanta Rondeto en Praha“ deziras korespondadi kun policistoj el la tuta mondo.

Adreso de l'internacia delegito: V. Zámstny, Praha XI., Palackého 26.

Praha XI (Ĉeĥoslov.) — S-ro V. Zámstny, Palackého 26. Interŝanĝas PM de la tuta mondo laŭ la katalogo Zumstein, Michel aŭ Yvert aŭ lau interkonsento. Ĉian demandon kaj proponon mi certe tuj respondas.

Praha XIII (Ĉ. S. R.) — S-ro Jaromir Jermár Jablonová 23, L., PK., pri literaturo kaj interlingvistiko. Filatelistoj atentu: Mi donas ĉiujn ĉsl. PM novajn je nominala prezo kontraŭ samkvanto alilanda.

Pyšely u Prahy (Ĉeĥoslovakio) — S-ro Jaroslav Kouba, gimnaziano de la VI-a klaso, PI, L, glumarkojn.

Rotterdam C. (Nederlando) — S-ro S. Stierman, ĉefoficisto, interŝanĝi ideojn pri policaj aferoj, laborkondiĉoj de uniformita polico, de detektivoj kaj de polica administrado.

Saint-Hilaire la Palud (Francujo, Deux-Sèvres) — S-ro Jacques Renaud, PK., L., kun alilandaj samideanoj.

Sutton (Britujo, Surrey) — S-ro J. Barry, 53a St. James Rd., serĉas J. Slavek, el Tyn n. Vlt., kaj aliajn ĉeĥoslov. amikajn.

Utrecht (Nederlando) — S-ro P. C. v. Holst, Bern. de Waalstraat 50, L., PK., PM kun seriozaj kolektantoj en Svislando kaj Lichtenstein.

Znojmo (Ĉeĥoslov.) — S-ro Láda Dorisek, sekretario, PM, PI, ktp

Zürich 6 (Svislando) — S-ro Ĉasar Rauber, ferv. trainestro, Schaffhauserstr. 24, PI., L., PM. k. ĉ. l.

Petoj kaj proponoj

Interligilo. — Poŝtistoj, telegrafistoj, telefonistoj, fervojistoj, filatelistoj, atentu! La internacia Ligo de ILEPTT baldaŭ reeldonos la organon INTERLIGILO, fakan revuon por vi kaj por progresigi Esperanton en niaj fakmedioj. Tuj skribu sur simpla

PK vian plenan adreson al INTERLIGILO, 46 rue Lamartine, Paris IX. Vi Vi ricevos la venontan numeron. Konatigu al ni adresojn de kolegoj.

Interŝanĝo. — Por korespondi kaj interŝanĝi PM. k. t. p. kun ĉiuj landoj, aliĝu al la trilingva klubo „Amikeco“ Jara kotizo 12 respond-kuponoj aŭ egal-valoro en neuzitaj jubileaj PM sendota al O. T. P. 4, str. J. C. Tissot, SAINT-ETIENNE Francujo.

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sveda reformatoro Swedenborg enportas la certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio bazita je la biblio kaj ĝia interna senco. Informas J. B. Vlach, Luzicka 21 Praha XII — Ĉ. S. R.

Poŝtmarkoj. — Progresinta kolektanto deziras interŝanĝi PM poŝte stampitajn kun Belgio, Ĉeĥoslovakio, Luksemburgo, Monako, Rumanio. Bazo: Zumstein, 1946. E. N. Thonney, 14, Rue d'Ecole de Médecine, Genève, Svis.

Reprezentado-perado. — Reprezentanto-aĉetisto metas sin je dispono de fabrikistoj komercistoj, reprezentistoj por oferi ĉiujn francajn produktaĵojn: Joseph Six, Rue de Rouvroy, Henin-Liétard Pas de Calais, Francujo.

Niaj Mortintoj

*La mond' aliĝas, la temp' pasas for.
Sed vivos eterne, pri ili memor'.*

Sinjoro **Marcel Bobin**, 70jaraĝa, januaro 1946. Nur mallonga informo en letero nin informis pri la forpaso de tiu ĉi samideano, Ano de la Lingva Komitato. Estis li, kiu en 1906 proponis en Genève al la kongreso la nomigon de esperantistaj agentoj aŭ konsuloj kaj laŭ lia propono, Hodler, Rousseau, kaj Stettler kreis kaj evoluis la gravan elementon de la movado: LA DELEGITO DE UEA.

Sinjoro **Jean Borel**, de Couvet, Neuchâtel, Svislando nask. 1868, mortis laŭ gazetinformoj dum februaro en Lugano. Kun li malaperas unu el la unuaj celkonsciaj pioniroj de nia movado en Germanujo, Lerninte Esperanton en Svislando, li estis unu el la kunfondintoj de la Svisa E-Societo. Instaligis en Berlino kaj fondis kun sia frato la bone konitan eldonfirmon Möller & Borel, la unua Esperanto eldonejo en Germanujo. Jean Borel verkis la plej uzitan germanan lernolibron, (Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache) kiu aperis ĝis 120 000 ekzempleroj, spite preskaŭ 200 (!) aliaj lernolibroj por germanoj de Esperanto. Jean Borel oferis multan monon, tempon kaj sanon por Esperanto sed malgraŭ senluziigo pri valoro de homoj, li konservis fidon al la valoro de l'ideo. Post la unua milito li loĝis ĉefe en Italujo, kunlaborinte al diversaj gazetoj inter alie al la grava „Journal de Genève“, li verkis ankaŭ libron pri la korporacioj laŭ itala sistemo. En la lastaj jaroj mi havis okazon renkonti lin en Genève, kien li venis por konsulti korespecialiston. Li tiam malplenigis sian koron, kun brilo en la okuloj priskribis sian vojaĝon al Varsovio por paroli kun D-ro Zamenhof mem. Cagrene li sciigis pri la sorto de la familio de nia majstro. Lastfoje mi lin parolis en Genève, Oktobro 1944 kaj tiam li jam tre malfacile spiris. Liajn manuskriptojn li donacis al la UEA biblioteko. Ripozu trankvile, kara amiko, viaj amikoj memoras vin! Hans Jakob.

Sinjoro **Vacláv Fiala**, D de UEA en Mladé apud C. Budejovice, CSR., pro memmortigo sin ĵetante sub rapidvagonaro, Januaro, 1946 (Laŭ informo de J. Pl. en C. B.)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

PALAIS WILSON - GENÈVE (SVISLANDO)

Oficiala Informilo 1946 (2)

Adreso de UEA. Gis plue validas la sama adreso, Palais Wilson, Genève, telefono 2.30.34. Personoj dezirantaj renkonti la Administranton bonvolu sin anonci antaŭe por fiksi tempon de rendevuo.

Organizo. Ni ricevis grandan nombron da korespondaĵoj aprobantaj emfaze la iniciaton de UEA atingi interkonsenton pri kunfandiĝo de la du ĉefaj organizaĵoj.

Post nelonge ni povos informi la publikon pri unuaj paŝoj faritaj. Laŭ silenta interkonsento detalaĵoj pri la plano de kunfandiĝo aperos post principa akcepto. Dezirante eviti similaĵn okazaĵojn kiel en 1934-36 ni submetos proponon al la aprobo de l'UEA anoj, kiam ĉio estos absolute klare.

Garantiita Kapitalo de UEA — Anonciĝis jam du garantiantoj akirintaj ĉiu unu ateston de la G. K. kaj per tio fariĝintaj Dumvivaj Membroj de UEA. Estas F-ino Vermaas, filino

de nia bedaŭrata amiko Vermaas en Rotterdam kaj S-ro R. Frochaux en Boudry, Svislando. Koran dankon al ambaŭ!

Subtenantoj 1946 — Jam bela nombro da samideanoj aliĝis kiel subtenantoj. La unuan liston ni publikigos en la venonta numero.

Premioj 1946. — La listo de elekteleblaj premioj aperos en unu el la venontaj numeroj.

Kotizoj. — Pro la malklareco de la situacio, ni ne povas indiki kotizojn en nacia mono respektiva (favorprezoj). Ni klopodas ke en la venonta numero ni povos tion fari por Bulgario, Jugoslavio k. a. Pro blokigo de la poŝtĉekkontoj propraj de UEA en Belgujo kaj Francujo, ni petas de nun pagi al niaj perantoj.

Kotiz-tabelo kaj pagmaniero

Estas citataj nur la landoj atingeblaj. Abono sen membreco, sama prezo kiel MA.

| | Mono | MJ | MA | MS |
|--------------|-------------------|----------------------|------|-----|
| Argentino | Pes. | 2.50 | 7.25 | 20 |
| Aŭstralio | Ŝil. | 4 | 10 | 25 |
| Belgio | Fr. | 50 | 100 | 250 |
| Brazilio | Milr. | 12 | 30 | 80 |
| Britlando | Ŝil. | 4 | 10 | 20 |
| Bulgarujo | Leva | Favorprezoj fiksitaj | | |
| Ĉeĥoslovakio | Kĉ. | 25 | 60 | 200 |
| Ĉinujo | Dol. | 3 | 7.50 | 20 |
| Egipto | Ŝil. | 4 | 10 | 25 |
| Finnlando | Fmk. | 50 | 100 | 250 |
| Francujo | Fr. fr. | 50 | 100 | 250 |
| Hispanujo | Pes. | 8 | 20 | 50 |
| Italujo | Lir. | 50 | 100 | 250 |
| Jugoslavio | Din. | Favorprezoj fiksitaj | | |
| Nederlando | G. | 2.50 | 5 | 10 |
| Novzelando | Ŝil. | 4 | 10 | 25 |
| Palestino | Laŭ brita tarifo, | | | |
| Portugalo | Esk. | 15 | 40 | 100 |
| Svedlando | Kr. | 5 | 10 | 20 |
| Svislando | Frk. | 5 | 10 | 20 |
| Urugvajo | Pes. | 2.50 | 5 | 20 |
| Usono | Dol. | 1 | 2.50 | 5 |

Al kiu oni pagu:

ĈD: Daniel Quarello, Casilla de Correo 47 (Suc. 13) Buenos-Aires.
Rekte al C. O. de UEA.
Peranto: C. Rogister, 21, Ave. Golenvaux, Namur. Poŝtĉeko Bruxelles 350 321.
Oni povas pagi al ĈD. portugala, aŭ rekte al UEA.
ĈD: A. E. Hepton, 10 Linden Ave., Cottingham, Yorkshire.
ĈD: R. K. Tričkov, ul. Knjajevska 63, Vratza, Bulg.
Peranto: Frant. Slavik, Praha, Uralské 9, poŝtĉekkonto 16204
Oni pagu rekte al C. O. de UEA. Genève.
Rekte al C. O. de UEA.
Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kää, poŝtĉekkonto 6564
D. Chagnoux, Yzeure s. A. poŝtĉeko 99.86, Clermont-Ferrand.
Peranto: Fernando Montserrat, Provença 79, Barcelona.
Poŝtĉeko estos malfermata post nelonge.
ĈD: R. Klajić, Svetog Save 23, Beograd.
ĈD: J. Telling, Schietbaanlaan 106-a, Rotterdam poŝtĉekkonto 2416.19
ĈD: L. E. Dust, 20 Chelsea Str. Mirmar, Wellington E-4.
Peranto: Fino Selma Moscicki, 25 Zefania str Jerusalem.
ĈD: Manuel de Freitas, Rua Monte da Lapa, 49-1. Porto.
Kosmos, för Universals Esperanto-Asocio, p. konto 44381, Göteborg.
(Korespondaĵoj al Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.
Rekte al C. O. de UEA, Poŝtĉeko: Genève I 2310
Al S-ro Alfredo Klein, Calle Uruguay 795, Montevideo.
ĈD: J. Dubin, 34 S., 16 th Street, Philadelphia, Pa.

Oficiala Informilo (Sekvoj)

Delegitoj de UEA. — Pro la tri jara izoligo de Svislando, la kontakto kun niaj Delegitoj preskaŭ ĉesis. Ni nun sisteme restarigas la reton de la Delegitoj de UEA. La Delegitoj oficantaj ĝis 1942 estas reelektataj post formala deklaro ree funkcii.

Unua listo:

Andon (Francujo, A.M.) — D.: Pons Funel

Antwerpen (Belgujo) — D.: Edgard de Coster, asekuristo, 162, Avenue de France.

Assen (Nederlando) — D.: F-ino Fr. Dallinga, apotekistino, Herenkamp 3.

Bergen op Zoom (Nederlando) — D.: J. F. C. M. Dercks, Antwerp-schestraat 45.

Birmingham 22 (Britujo) — D.: John Collier, 14 Warren Hill Erdington.

Boudry (Svis., Neuchâtel) — D.: Robert Frochoux, oficisto.

Bourg-en-Bresse (Francujo, Ain) — D.: Henri Huttin, hon. notario, 11 Rue Teynière.

Bruxelles (Belgujo) — D.: Frédéric van den Brande, 58, Rue de l'Eglise, Jette.

VD.: S-ino De Meyer, 70, Rue Saint-Vincent de Paul, Bruxelles-Jette.

FD.: (Junuloj) — F-ino M. van Dijk, anino de la Y. W. C. A., 36 A rue Jourdan.

FD.: (Komerco-Turismo) — Victor van den Brande, 109, Rue Ferdinand Lenoir.

Buenos-Aires (Argentino)

CD.: Daniel Quarello, C. de Correo 47 (Suc. 13)

D.: Aleksandro Spiré, C. de Correo 418

VD.: A. Lopez Luna, C. de Correo 2507.

VD.: Luis Vicino, Castro Barros 1015-29.

FD (Katolikismo) P. Alberto P. Perpétua, Ave. Velez Sarsfield 40 (Monaĥejo Santo Domingo Cordoba)

Chatel-Guyon (Francujo, Puy-de-Dôme) — D.: Constant Martin, Villa Espero, Le Patural.

Genova (Italio) — D.: Giovanni Barni, ledrafinisto, Corso Sardegna 73/2.

Heemskerk (Nederlando) — D.: M. Doekes, muelisto, Kerkweg 26.

Jyderup (Danlando) — D.: Erik Pedersen, Holbaekvej 28.

Marseille (Francujo) — D.: (Instruado) Jean Beau, profesoro, 21 Bd. Faidherbe.

Milano-Parabiago (Italio) — D.: Paolo Bossi, komisiisto.

Montpellier (Francujo, Hérault) — D.: Louis Rossignol, agente de la Aera Oficejo ĉe la administracio de la Pontoj kaj ŝoseoj, 7 rue Sébastien Bourdon.

Neštemice n. L. (Ĉeĥoslov.) — D.: Karel Stárek, Solvayovy závody.

Nivelles (Belgujo) — D.: Jozefo De Maeyer, katolika pastro, Collège Sainte Gertrude.

Peizermade-Drenthe (Nederlando) — D.: S-ro A. H. Haupt.

Perez-Millan (Argentino, F. C. del E.) — D.: Iberjo Rodrígaez.

Petrograd (Jugoslavio, Banat) — D.: Dragan Dimitrijević, juĝisto, Sudija sreskog narodnog Suda.

Pirdop (Bulgario) — D.: Ivan H. Krestanov, gimnazia profesoro.

Plzen (Ĉeĥoslovakio) — D.: Frant. Kavan komerca konsulanto, Benešova tr. 93.

VD.: Inĝ. Rudolf Novák, direktoro de elektriĉa entrepreno, Plzen III, Manesova tr. 59.

Prades (Francujo, Pyrénées Or.) — D.: S-ino Jeanne Dedicu instruistino, 23, Rue Victor Hugo.

Ried i. I. (Aŭstrio) — D.: Johann Jungschafer, lerneja direktoro.

Rosario (Argentino, Santa Fé) — D.: Hugo J. Ceretti, inĝeniery, 9 de Julio 3301.

Rotterdam W. (Nederlando) — D.: (Haven- kaj navigadaferoj) J. P. van Dijk, ĉefoficisto ĉe la komununa haven-administracio, Hooidrift 98 B.

Secaux (Francujo, Seine) — D.: Georges Martzloff, profesoro, 6 rue Bertron.

Schönwald-Rückersdorf apud Friedland (Ĉeĥoslovakio) — D.: Franz Wirth, romkatolika dekano, v Schönwalde 117 u Frydlantu v Cechách.

Slidrecht (Nederlando) — D.: F-ino J. H. P. van Ouwerkerk, Stationsweg 18.

Sowerby Bridge (Anglujo, Yorkshire) — D.: John Hoyle, 13 Finkle Road.

Tarrasa (Hispan., Katalunio) — D.: Sebastian Chaler, San Mariano 159.

VD.: Vicente Garcia, Valle 9.

Trapani (Italio) — D.: Valentino Valentini, Via Santa Maria di Capua 14.

Varazzo (Italio) — D.: Vittorio Marcone, oficisto, Via Bardi 6.

Zilina (Ĉeĥoslovakio) — D.: Arnost Vána, Pivovarska 3.

Zürich 6 (Svislando) — D.: Cäsar Rauber, SBB-CFF, trainestro, Schaffhauserstr. 24.

Radio-Genève

Dissendo en E. — Informoj de la Ruĝa Kruco, ĉiudimanĉe 19h10 ondolongo 48.66.

